Prezo: 7 €
www.satesperanto.org
Januaro-Februaro 2018 | n-ro 01-02 (1351-1352)

# Sennaciulo

Oficiala organo de Sennacieca Asocio Tutmonda



SAT-anoj kutimiĝu al eksternacia sent-, pens- kaj agadkapablo!

# Kio gravas?

Se verkisto vorte pavas,
liaj vortoj ne tre gravas.
Ĉu, se vortoj sencon havas,
tiuj vortoj ĉiam ravas ?

Kio gravas, kiu pavas,
kio homojn vere ravas ?
Pluajn dubojn mi eĉ havas.
Eble ĉiu homo gravas.

Eble gravas la atomoj,
tiom, kiom ni, la homoj.
Eble ĉiu stelo gravas,
eĉ se ĝi ne sencon havas.

Kio plu je vero gravas,
se la parolanto pavas ?
Se vi pavas, ĉu vi gravas,
ĉar pavuloj ĉiam pravas ?

Kaj se homo mem decidas,
ĉu li plu gravecon fidas ?
Ĉu la mondo tuj pereus,
se la hom' gravulojn neus ?

Certe gravas kre-pasio
pli ol vanta mondkonscio.
Kaj homara harmonio
pli ol nur laborpasio.

Hans-Georg Kaiser




**Ne grava, sed rava... la poŝtmarka elefantoĝardeno...**

## ✍ REDAKTANGULO ✍

Karaj legantoj,

Jen finfine la unua numero por la jarkolekto 2018, pretigita en urĝo kun la celo iom rekapti la ĝustan aperritmon.

En ĝi estas legebla la rezulto de la referendumo, ne nur pri la konsisto de la venontaj Plenum-Komitato kaj Ĝenerala Konsilantaro, sed ankaŭ pri la redaktopolitiko de *Sennaciulo*. Klara plimulto opinias, ke ne necesas pli strikta enhava kontrolo de la kontribuoj. Signifa malplimulto opinias la malon, kaj meze staras multaj hezitantoj. Tio devigas nin ĉiujn al plua respektema debato inter malsamopiniantoj, cetere tute normala afero en asocio kiel SAT. Tiurilate estas, kiel kutime, multe da materialo por daŭrigo de kolektiva pripensado en la nuna numero.

En 2015 nur dekono de la membraro partoprenis en la voĉdonado. Ĉi-foje partoprenis pli ol triono de ĝi. Jen kuraĝiga signo pri la intereso de SAT-anoj al la vivo de sia asocio. Ĉu tiu intereso ankaŭ speguliĝos en la diverseco de kontribuoj, enhavaj kaj redaktaj, al la venontaj numeroj de *Sennaciulo*? La respondo dependas parte de ĉiu el ni.

Kunlaboreme,

La Redaktoskipo

## *Venontaj limdatoj*

Sennaciulo 5-6/2018 (1353-1354) : 20a de majo

Sennaciulo 7-8/2018 (1355-1356) : 15a de junio

***Frontpaĝa bildo:***

Unueca kun la universo kaj kunruliĝinta en sin mem, aŭ voli esti konko.

Aŭtoro: Hans-Georg Kaiser

# *Enhavo*


### Beletro
2 Kio gravas? Hans-Georg KAISER
28 Reguliga klapo Serĝo SIR'
31 Bioniko kaj Pavo Serĝo SIR'

### Tra la Mondo
4 Kiel elverŝiĝas Usono Alekstandr ROĜERS

### Tra la Mondo – Kurdio
5 "La civiluloj estas la celo de la atako kontraŭ Afrino" Orsola CASAGRANDE
6 Vivi inter ruinoj Orsola CASAGRANDE
8 "Ne ŝajnas al mi, ke nun estos granda milito en Sirio" Mikel RODRIGUEZ

### Tra la Mondo – Israelo
10 Deklaro de Universala Esperanto-Asocio okaze de la Tago de Holokaŭsta Memoro
11 Postvivantoj de la Holokaŭsto suferas pro malriĉeco
12 Israelo detruas lernejon… por la kvina fojo

### Tra la Mondo – Okcident-Eŭropo
12 "Neniu ŝtato agnoskas iam ajn, ke ĝi havas politikajn prizonulojn" Lander MUÑAGORRI GARMENDIA
13 Nuligita: londona kunveno de Keep Talking Ian FANTOM

### Tra la Mondo – Orient-Eŭropo
15 Poloj reduktas siajn partoprenojn en religiaj ceremonioj Mir-Ko
17 Kaj nenion rifuzu por vi Andrej ŜVEDOV
18 Pluso kaj ankoraŭ pluso rezultigas minuson Janis FELSBERG
19 Maljunaj homoj postulas konsideri ankaŭ siajn interesojn Grigorij ANTONOV

### Medio
20 Mizera aera kondiĉo de Nepalo Sandip LAMICHANE
21 Kial kaj kiel mi fariĝis vegetarano? Terano

### Pacismo
22 Ĉu armeo aŭ civila neperforta defendo?

### Nekrologo
23 MAGNANI Remo - André Sadier - Claude Gicquel

### El la leterkesto
25 Sekvo de diskuto pri kulturaj valoroj Josef KROB
26 Forigi el la Korano alvokojn al la mortigo Francisko DEGOUL

### Intelekta memdefendo
26 Mitoj kaj realo pri la laborista klaso kaj SAT Pedro SANZ

### El la SAT-Administrejo
24 Rezultoj referendumo 2018
31 Novaj Aliĝoj | Donacintoj
30 Perantoj | Kotizoj | Praktikaj informoj



*Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Ricevitajn manuskriptojn ni ne resendas. Kontribuojn sendu al:*
***sennaciulo.redaktejo@gmail.com***